

Eugène De Zilah diras kial
Monda Federacio de Kulturaj Asocioj estas necesa
Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-167/Radiokasedo-167-8-86-A-1038-Claude-GACOND-Eugene-De-Zilah-diras-kial-Monda-Federacio-de-Kulturaj-Asocioj-estas-necesa.mp3>

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ Claude Gacond konversacias por la tria fojo kun d-ro Eugène de Zilah, la redaktoro de la nova kultur-kleriga revuo, La Gazeto.

S-ro Eugène de Zilah, fakte, vi estas unu el tiuj ‘produktoj’ de la nova generacio de la esperanto-movado, ĉu ne? Vi alvenis al Esperanto ne pro, ni diru, la idealo, sed preskaŭ pro profesia kaŭzo. Ĉu, eble, vi rakontu pri tio ?

EdZ.- Nu, jes. Eĉ tiel oni ne devus kredi ke nun mi nehavas aŭ ne konas la idealon. Sed fakte, kiam mi alvenis al Esperanto, ĉi tiu tute ne estis pri idealaj kaŭzoj. Mi diru, ke Esperanto por mi estis, ni diru, la 11-a lingvo, kiun mi ellernis. Kaj mi ellernis ĝin ĉar iu el miaj studentoj parolis pri ĉi tiu lingvo kaj petis mian opinion pri internaciaj lingvoj kaj mi respondis al li, kion mi sciis pri la Universala Lingvo de Leibniz, pri Volapük, ankaŭ mi sciis iom pri Esperanto, kiun mi legis en diversaj libroj.

Cl.- Kaj tiam vi dokumentiĝis kaj fariĝis esperantisto.

EdZ.- Jes, estis stranga momento, ĉar ĉi tiu studento jam estis iom esperantista kaj li diris, ke por homo kiel vi, kiel vi jam scias lingvojn, ĉu ne estus pli simple ellerni Esperanton por vere scii, kio ĝi estas. Kaj fakte mi opiniis, ke li pravus, ke vere li ektrovis min parolante pri afero kiun mi ne sufiĉe bone konas. Kaj pro ĉi tiu honto-sento mi komencis ellerni la lingvon. Mi aĉetis ‘Assimil’-metodon farita de s-ro Thierry en Francio, sed mi aĉetis ĝin el Belgio, el Bruselo, antaŭ sep jaroj. Kaj do mi eklernis la lingvon pro tiu komenco kaj poste mi provis uzi ĝin.

Cl.- Kaj tie alvenis la problemo, ĉu ne ? Vi reprezentis tiun medion, kiu ŝatus ne nur ferie, ne nur hobie uzi la lingvon, sed fakte. Kaj kion vi trovis tiurilate ?

EdZ.- Jes. Aperis al mi ke oni uzas ferie, hobie Esperanton kaj ke samtempe inter fakuloj, ĉefe en la tielnomataj ‘homaj sciencoj’, kie oni devas paroli sufiĉe alt-nivele kaj sufiĉe precize, oni uzas aliajn lingvojn, kiujn oni ofte ne tro bone scipovas paroli, eĉ se oni legas ĝin sufiĉe bone. Kaj do mi volis paroli en Esperanto kun kolegoj.

Cl.- Do, vi diras ‘kolegoj’, en kiu fako vi estas, vi instruas?

EdZ.- Kolegoj filozofoj. Mi estas profesoro, licea profesoro pri filozofio kaj en tiu tempo mi ankaŭ estis profesoro pri logiko en la Metz-a Universitato. Kaj aperis, ke la faka uzado de Esperanto ne estas sufiĉe disvolvigita. Ke finfine oni ne povas publikigi en Esperanto, ĉar ne estas faka publiko, kiu legas Esperanton. La uzo de la lingvo estas tro hobia. Kaj tiam aperis al mi la nepre neceso fari fakajn asociojn de scienculoj, de fakuloj, kiuj vere disvolvigas sian sciencon pere de Esperanto, dank’ al Esperanto.

Cl.- Kaj vi laboris por krei tion, ĉu ne ? Eble vi rakontu pri tiu kreado. Kreiĝas, se mi ne eraras do, monda federacio, kiu grupigu kulturajn asociojn aŭ fakajn asociojn. Eble vi raportu pri tiu kreo.

EdZ.- Jes. Antaŭ du jaroj, en Antverpeno, la temo de la Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado estis ĝuste la komunikado. Kaj oni vidis ĉi tiun mankon komuniki faknivele. Kaj oni ekvidis, ke unu el la kaŭzoj estis, ke la esperantistaj organizaĵoj, pleonasme, estas esperantistaj kaj nur esperantistaj. Do estas homoj bonegaj, kiuj volas flegi Esperanton, sed ne sufiĉe da homoj, kiuj volas flegi sciencon. Do, oni pensis, ĉu ne eblas fari iun kunlaborcentron, ion interligantan servon, en kiu povus enveni fakaj asocioj, eĉ se ili ne laboras nur esperante, sed kiuj simple akceptas kiel unu el siaj laborlingvoj Esperanton. Kaj kontaktigi ĉi tiujn fakajn grupojn kun la bazaj grupoj de Esperanto, kun la kulturaj centroj de Esperanto kaj kun la revuoj, ĵurnaloj de Esperanto. Do, kunligi ĉi tiun agadon iumaniere, por ke la informaj trafiku. Do elvenis la ideo agi laŭ kvar aktoj : *unue*, preciziĝis la afero ke sen kleriga periodaĵo oni nenion povos fari.

Cl.- Kaj tial estas la celo de kreo La Gazeto. Ĉu ne ? Kaj ni parolis dum du elsendoj.

EdZ.- Poste, *due*, necesis organizi la internaciajn forumojn de la Monda Federacio de Kulturaj Asocioj, kiuj estas konceptitaj kiel iu foirejo. Do, la homoj nur venas alportante kion ili faris, parolas pri tiu, varbadas novajn membrojn kaj kontaktiĝas inter ili kunlaborante el vidpunktoj de siaj fakoj aŭ eĉ el turismaj kaj simple individuaj vidpunktoj, kaj ĉefe oni povas interkontaktiĝi sen interpretistoj kaj sen, ni diru, materiaj pruvaj, kiuj restas post ĉi tiuj renkontoj.

Cl.- Kaj pri la du aliaj aktoj de via aktiveco ?

EdZ.- Do, la *du aliaj* aktoj estas la organizado de simpozioj por siaj fakaj asocioj, por la fakaj asocioj de la Monda Federacio de Kulturaj Asocioj, kaj organizado de staĝoj de lernado de la lingvo por la fakaj grupoj.

Cl.- Do, por ke la grupoj esperantiĝu ?

EdZ.- Por ke la grupoj esperantiĝu. Nia ideo estas ke fakuloj alvenas, ne sufiĉe bone scipovante Esperanton, interparolas pri siaj fakaj aferoj kaj samtempe plibonigas sian Esperanton. Kaj *kvar*, necesos krei novajn fakajn asociojn, ĉar en multe da fakoj ankoraŭ ne ekzistas esperantlingvaj asocioj, fakaj asocioj, sciencaj asocioj kaj ankaŭ ekzistas kelkaj fakaj asocioj, kiuj eble ne volus kunlabori...

Cl.- ... aŭ dormas, ĉu ne ?

EdZ.- aŭ dormas, aŭ ne volas kunlabori enkadre de la Monda Federacio de Kulturaj Asocioj. Ĉi tiuj asocioj do havos la konkurencon de paralelaj asocioj fakaj de la Monda Federacio de Kulturaj Asocioj. Kaj el la konkurenco sparkos la vero kaj la laboro.

Cl.- La konkurenco estas necesa por la vigligo de ĉio. Kaj ofte estas danĝero, kiu minacas la esperantistojn, ili volas fari nur unu solan en la mondo, asocion por ĉiu fako. Kaj tio estas verŝajne falsa vido pri la evoluo de Esperanto.

EdZ.- Tion mi pensas, fakte.

Cl.- Kiamokazos fakte la venonta kunveno de tiuj simpozioj aŭ grupoj ?

EdZ.- La dua Internacia Forumo de la Monda Federacio de Kulturaj Asocioj okazos en Ateno, ĉi-jare, de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto. Samtempe, ke okazas la 12-a Internacia Konferenco de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado. Do en Ateno, fine de julio.

Cl.- Se aŭskultantoj estas interesataj pri tio, ili simple skribu al Svisa Radio Internacia kaj ni tre volonte sendos al ili la informilon kaj transdonos iliajn petojn.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond konversaciis kun d-ro Eugène de Zilah, la redaktoro de la revuo La Gazeto kaj sekretario de Monda Federacio de Kulturaj Asocioj. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*